## *Hanni FISCHER-BURI*

*1894-1961*



F. lernis Eon per Cseh-kurso instige de la 31a UK (Berno 1939). Poste ŝi mem helpis kiel LKK-anino organizi la 32an UK (Berno 1947). Sed ŝi rolis ankaŭ kiel IEL-delegitino, prezidantino de la berna EG, anino de la CK de SES, kies honora membro ŝi fariĝis. Kun sia edzo F., kiu mem frekventis la faklernejon hotelistan, estris dum tri jardekoj la hotelon-restoracion Metropol en Berno, kiu siatempe servis kiel centro de la bernaj e-istoj. Posedante la superan diplomon de SES, F. instruis Eon kaj vekis la intereson pri Eo ĉe multaj eminentaj personoj, kiel ekzemple ĉe →Arnold Bohren. Krome ŝi sukcesis enkonduki la Eo-instruadon en la kursaron de la popola altlernejo en Berno. Kiam ŝi retiriĝis kiel hotelistino en novembro 1954, ŝi restarigis la →Svisan Eo-Instituton, kiun fondis ŝia antaŭulo →Eduard Spielmann. Kun →William Perrenoud F. sekve kreis la fundamenton por la internaciaj feriokursoj en →Kastelo Münchenwiler/BE, kiujn ŝi administris kadre de la instituto. Post ŝia morto la instituto ĉesis funkcii. F. estis dumviva membro de UEA kaj ano de la Universala Ligo.

→Berno →Kastelo Münchenwiler
→Svisa Esperanto-Societo

## *Wilhelm FLAMMER*

*1909-1977*




Post la gimnazio en Stans/NW kaj la studado pri filozofio kaj katolika teologio en la universitatoj de Fribourg i.U. kaj Freiburg i.Br., F. laboris kiel instruisto en la gimnazio de Schwyz (1935-41), poste kiel direktoro de la Eduka Instituto Thurhof en Oberbüren/SG (1941-48). Poste li fariĝis pastro en St. Gallen, Montlingen/SG kaj Zürchersmühle-Urnäsch/AR, kie li estis UEA-delegito ekde 1963. F. rolis kiel sekretario kaj redaktoro de IKUE, kiel ĝia svisa reprezentanto respektive prezidanto de SKUE, li verkis *Katolikan Terminaron* (1963) kaj, kunlabore kun tri aliaj e-istoj, tradukis la enciklikon *La surtera paco* de papo Johano XXIII. Kun →William Perrenoud F. tradukis en 1965 ankaŭ la papan enciklikon *La vojoj de la eklezio.* En 1966 li organizis la IKUE-kongreson en St. Gallen, en 1967 kunaranĝis la regionan kunvenon de SES en WIL/SG kaj en 1977 predikis dum la trilanda renkontiĝo en Bregenz (Aŭstrio). Dum du jaroj li servis ankaŭ kiel redaktoro de *Svisa Espero.*

→Kristanoj

## *Auguste FOREL*

*1848-1931*

F. estis grava svisa personeco, fama klerulo, sciencisto-humanisto kaj socia aganto kun monda signifo, kiu aktivadis ege multfacete kaj pionire sur pluraj kampoj: profesie kiel kuracisto-psikiatro, neŭropatologo, cerb-anatomo, entomologo, higienisto, seksologo, hipnotizisto, filozofo-moralisto. Konata kiel formikologo, publika, socia kaj politika aganto, F. engaĝiĝis kiel reformisto de la juro, estis adepto de la alkohol-abstina ideo, de la federalisma sistemo kaj de la pacaktivado. F. pledis por internacia juro kaj interpopola paco anstataŭ interŝtata milito, por malarmado anstataŭ armado, por unuiĝo de la nacioj anstataŭ naciaj antagonismoj kaj ŝovinismo, por egalrajta internacia libera komerco anstataŭ baroj per dogano; li esprimiĝis favore al samaj rajtoj por kolonioj kaj ties homoj anstataŭ ilia ekspluatado fare de koloniistoj. Li esprimis sin favore al emancipiĝo kaj libereco de la homaro, sugestis civilservon anstataŭ ŝtata armeo, pledis por etika kaj sociala edukado de la junularo kaj por la akcelo de la popola kleriĝo. En sia postulado de egalaj rajtoj por viroj kaj virinoj F. celis la voĉdonrajton por virinoj, la faciligon de la divorco kaj la samajn devojn de la gepatroj rilate al ties infanoj, sendepende ĉu ili estas geedzoj aŭ ne. F. aliĝis al la movadoj de la bontemplanoj (1892), socialistoj (1916) kaj bahaanoj (1920/21).

*Profesia kariero kaj privata vivo:* F. vizitis la gimnazion en Morges/VD (naskiĝloko) kaj la kantonan lernejon en Laŭzano (abiturientiĝo en 1866). Rifuzinte la protestantan konfirmacion, F. alproksimiĝis al liber-pensado kaj al la koncepto pri panteismo kaj monismo, la kredo pri la unueco de korpo kaj animo. Li mem eskapis la armean servon kaj preferis la civilservon. 1866-71 li studis medicinon en Zuriko kaj doktoriĝis en 1872, sekve li laboris kiel asistento en Munkeno kaj habilitiĝis en 1877. En 1879 F. estis vokita de la zurika kantona registaro por okupi la vakan postenon de kuracisto en la psikiatrejo Burghölzli en Zuriko. F., kiu estis ankaŭ profesoro en la zurika universitato kaj kiu havis almenaŭ du honordoktorajn titolojn, demisiis en 1897 pro labor-laciĝo kaj malsanemo kiel direktoro de la kliniko Burghölzli kaj revenis kiel emerito al Romandio. En 1902 li akiris domon en Yvorne ĉe Aigle/VD, kie li mortis en 1931. Ĉi tiu loĝejo, baptita je la nomo 'La Fourmillière' (La Formikejo), fariĝis centro de vigla aktiveco kaj scienca esplorado kaj korespondado. Ĉi tie F. ankaŭ akceptis famajn gastojn kiel la francan verkiston Romain Rolland (1866-1944) kaj la rusan verkiston kaj politikiston Anatolij Lunaĉarskij (1875-1933) k.a. En Romandio la pensiulo finfine trovis tempon por pasie dediĉi sin al la kontraŭalkohola lukto, al sociaj aferoj, al demandoj pri la seksa moralo kaj al la amataj formikoj. En 1912 apopleksio paralizis lian dekstran brakon kaj bremsis lian vivoritmon kaj lian tutan agadon.

La patro de F., Victor F. (+1914), estis geometro kaj kamparano, la patrin-flanka familio de F. devenis el la franca departemento Drôme kaj apartenis al la konservativa, protestanta (kalvinisma) 'Libera Eklezio'. En 1883 F. edziĝis kun la eĉ ne 18-jara germanino Emma Steinheil, filino de amiko, kiu naskis entute ses infanojn kaj fariĝis grava helpantino de F.

*Aliaj agadoj:* Dummilite F. subtenis la fondon de komitato por Ligo de Nacioj kaj prezidis ĝian romandan sekcion (en 1920 efektiviĝis la fondo de →Ligo de Nacioj). En 1914/15 F. aperigis broŝuron sub la titolo *La Unuiĝintaj Ŝtatoj de la Mondo*, en kiu li priskribis sian kulturan programon por la tempo post la milito. La teksto entenis ankaŭ tutan ĉapitron pri la demando de la neŭtrala universala lingvo. Dum sia vivo F. entreprenis plurajn studvojaĝojn, kiuj

kondukis lin al Nordafriko, la balkanaj landoj (precipe Bulgario, Grekio kaj Turkio), Norvegio, Norda kaj Suda Ameriko kaj al Ruslando. F. ĉiam pledis por kosmopolita sinteno, por libereco kaj sendependeco de malgrandaj popoloj kaj multe interesiĝis pri la aferoj okazantaj en aliaj landoj. Kun simpatio kaj apogo al la nacia renaskiĝo de la latva kaj bulgara popoloj F. aperigis ĉi-temajn broŝurojn en 1917 kaj 1918 (okaze de la germana okupo de Kurlando, nuntempa Latvio).


Nachdruck u. Uebersetzung gestattet, selbst ohne Angabe des Verfassers.

Die

Vereinigten Staaten

der Erde

(Ein Kulturprogramm)

von

Dr. med. phil. (h. c.) u. jur. (h. c.) AUGUST FOREL

ehemaliger Professor an der Universität Zürich.

« Bund für Organisierung menschlichen Fortschritts »

LAUSANNE (Schweiz)

60, Avenue de Rumine.

1914/15

A. Forel: *Die Vereinigten Staaten der Erde*, 1914/15


F. apartenis al la unuaj kuracistoj, kiuj ne nur bonvenigis kontraŭkoncipilojn por virinoj, sed kiuj ankaŭ enkondukis la steriligon ĉe heredaj kaj mensaj malsanuloj. Li subtenis la eŭgenikon, t.e. la teorion pri la artefarita plibonigo de la hered(it)aj genoj. La tiama ras-higiena politiko kaj la eŭgeniko estis kontestataj, kritikataj kaj pridubataj fone al la kreskantaj rasismo kaj antisemitismo propagandataj de la fortiĝanta nacisocialista politiko en Eŭropo, precipe Germanio, kiu nutriĝis de tiaj rasaj ideoj. Senkonsidere al la de li reprezentita ras-higiena teorio F. ĉiam emfazis, ke ŝovinismo, radikala nacia patriotismo, prusa imperiismo, pangermana militismo kaj antisemitismo neniel trovas lokon en liaj pensado kaj agado. La ras-higienaj imagoj kaj konsideroj de F. devas esti komprenataj fone de la ekzistado de gravaj homaj malsanoj kiel ekzemple la tuberkulozo, kiu psiĥoze timigis vastajn socitavolojn de lia epoko, kiuj kredis ke hereditaj malsanoj de 'malsuperaj' klasoj povus detrui la 'superajn' klasojn kaj konduki al la degenero de la civilizita parto de la homaro. Ĝuste en tiu ras-higiena kunteksto la eŭgeniko akiris enorman signifon kaj, ĝuante sciencan agnoskon, sukcesis propagandi la plugeneradon de herede sanaj homoj kaj la steriligon de malsanuloj.

*Neŭtrala universala lingvo:* Lige kun siaj humanismaj kaj pacistaj engaĝiĝoj F. dekomence rilatis kun intereso, eĉ entuziasmo al la ideo de neŭtrala universala lingvo. Kredante je la neceso de la unuiĝo de la popoloj de la mondo kaj ankaŭ je la raciiĝo de la lingvolernado, F. uzis plurajn okazojn esprimiĝi pri senco kaj esenco de la mondhelplingva ideo. Ĉi tiu ideo perfekte lokiĝis en lia kunteksto de pli alta homa civilizo priskribata kaj postulata de la vaŭda moralisto.

En siaj memuaroj *Rerigardo al mia vivo* (1935) F. raportis, ke apud la demandoj pri rasoj, virinaj rajtoj kaj la seksa problemo okupis lin „la demando de la internacia lingvo, pli ĝuste de la mondhelplingvo, kiu senlime akcelus la internacian pacon kaj la reciprokan interkompreniĝon." Laŭ tiu raporto F. komencis studi Volapukon, kiu al li ne plaĉis pro ĝia malbeleco kaj komplikeco, kaj poste transiris al Eo, kiun li eklernis komence de 1906: „Tiam mi lernis dum plenaj kvin horoj la internacian lingvon de Zamenhof, se ne paroli, tamen almenaŭ legi kaj skribi ĝin, tiel ke la 28an de Aŭgusto [1906] mi povis ĉeesti la Eo-kongreson en Ĝenevo kaj tie sufiĉe bone kompreni la flue eldiritajn paroladojn. La anglojn mi komprenis multe pli bone en Eo ol en la angla." Dum la kongreso, kie li persone

konatiĝis kun L.L. Zamenhof, F. entuziasmiĝis pri la afero, tiel ke sekvontjare li „faris al si la plezuron" priskribi formikan specion en Eo - la artikolo aperis en *Internacia Scienca Revuo* (4/1907).
Okupiĝante pri lingvaj kaj ortografiaj demandoj, jam en 1902 F. verkis germanlingvan artikolon sub la titolo *Terminologio kaj mondlingvo*, kie li deklaris la lingvojn latinan kaj antikvan grekan mortaj kaj la provon revivigi ilin „vanta iluzio" kaj vana klopodo. Laŭ li tiuj lingvoj ne plu taŭgas por la moderna tempo. Koncerne la rolon de la angla lingvo kiel internacia F. esprimis skeptikon pro du kialoj: Kvankam la angla lingvo estas la plej disvastigita, tamen ĝi estas tre nebonsona, eĉ tute ne fonetika; due pro envio al la monopolo de unusola lingvo, la ceteraj nacioj ne agnoskus la anglan en la rolo de internacia lingvo. La argumentoj por la sukceso de neŭtrala universala lingvo, listigitaj de F., estas la neceso je internacieco de ĝia radikaro, je fonetikeco, je simpleco de la sintakso kaj je ĝia rolo kiel lingvo taŭga por scienco, arto, filozofio kaj komerco. Fine de sia artikolo en *Terminologio kaj mondlingvo* F. esperis, ke elstaraj personecoj pluokupiĝos pri la ideo de la neŭtrala universala lingvo kaj laboros favore al ĝiaj realiĝo, plukonstruo kaj pluevoluo. Samtempe F. tre bone komprenis, ke la ideo de la neŭtrala universala lingvo kaj la klopodo efektivigi ĝin ĝis nun suferis multajn infanajn malsanojn, kiuj kune kun siaj misformiĝoj devus malaperi. Tial F. opiniis, ke estas necese, ke tia mondhelplingvo devus definitiviĝi kaj disvastiĝi per la helpo de mondlingva akademio kaj per la rimedoj de la internacia komerco. Laŭ raporto de *Svisa Espero,* decembro 1904, en *Tribune de Lausanne* aperis artikolo de F. pri la temo de la ortografia reformo, en kiu li menciis la modelon de Eo, kies simplan ortografion li laŭdis.
Kadre de interesa prelego ĉe la *Internacia Ordeno por Etiko kaj Kulturo (IOEK),* societo iniciatita de F. mem, kiu celis puŝi la etikan socialan progreson, spiritan liberecon kaj civilizecon sen influo de partipolitika dogmeco, la 27an de februaro 1910 en Berno (Svislando) F. kaptis la okazon prezenti en tuta vasteco la esencon de sia 'filozofio' maturiĝinta ĝis tiu periodo. Ĝuste en tiu prelego oni povas ricevi la pruvon, kiom multe por F. signifis la demando de la neceso de la enkonduko de la neŭtrala universala helplingvo. F. perfekte perceptis la argumentadon de L.L. Zamenhof favore al la internacia helplingvo, kaj en maniero konvinka, racia-logika kaj pasia, sed nefanatika F. publike varbis por tiu nobla ideo. Lian bernan prelegon esperantigis la svisa e-isto →Friedrich Uhlmann kaj publikigis ĝin en 1911 en broŝuro sub la titolo *Kulturceladoj de la nuntempo* (→Antologio). Uhlmann kunlaboris kun F. kiel redaktoro de la gazeto *La Nova Kulturo,* „oficiala organo de la esperanta fako de l'IOEK".






Forel en 1908, ekslibriso de Auguste Forel

Kritikinte aliajn konatajn planlingvajn sistemojn, F. proklamis Eon kiel praktike jam pruviĝintan mondlingvon, kiu estas treege facile lernebla, parolebla kaj skribebla, kaj bedaŭris, ke al ĝi mankas la oficiala (eĉ deviga) enkonduko ekzemple en la lernejojn far la registaroj.
F. substrekis la utilon de tia lingvo por la lernado de fremdaj lingvoj (propedeŭtika valoro de Eo; →Pierre Bovet) kaj emfazis la gravecon de neŭtrala universala lingvo por la scienco, kiu tiom plisimpligus ĝian laboron, la vojaĝadon kaj vivadon. F. estis eĉ konvinkita, ke tia helplingvo entute „nin eligus el la hodiaŭa Babel'a turo", ĉar la malamikeco inter la kulturaj popoloj laŭ F. fontas krom el religiaj kontrastoj ankaŭ esence el lingvaj kialoj. Kiel pruvo por tiu aserto

servis al li liaj personaj spertoj faritaj dum la ĝeneva UK. F., kiu dum sia tuta vivo luktadis kaj baraktadis kontraŭ enorma socia konservativeco, klarigis al la interesata publiko, ke la antaŭjuĝoj kaj la inerteco kontraŭstaras la grandegan kulturprogreson de la enkonduko de neŭtrala universala lingvo, kaj li ankaŭ ne forgesis, ke Zamenhof atentigis, ke la neŭtrala universala lingvo ne servu kiel anstataŭanto por la gepatra lingvo. F. ne nur mallaŭdis la antaŭjuĝojn, kiuj regas en la mensoj de la homoj, sed bedaŭris ankaŭ la skeptikon kaj indiferentecon de la filologoj, kies konsternitajn reagojn al la projekto de internacia planlingvo li ne povis kompreni.




Forel-poŝtmarko (1971) kaj svisa monbileto




En sia ideologia ĉefverko *La Vojo al la kulturo* (1924) troviĝas aparta ĉapitro, kiu resumas ĉiujn liajn pensojn kaj konvinkojn pri la demando de neŭtrala universala lingvo. Ĉi-rilate li atribuis pli da atento al aspektoj lingvistikaj-filologiaj. Ankoraŭfoje li prezentis la kritikon pri ĉiuj internacilingvaj sistemoj, kiujn li konis (precipe Mundolingue de Julius Lott kaj Pasilingua de Peter Steiner) por praviĝi, ke Eo estas la plej taŭga solvo el ĉiuj. Li prijuĝis ĝin supera al ĉiuj aliaj projektoj, „ĉar ĝi baziĝas sur la ĉie uzataj latinaj kaj grekaj radikoj kaj ĉar ĝi posedas ege simplan fonetikan, gramatikan kaj sintaksan strukturon.” Samtempe li kritikis, ke Eo forlasis la puran latinan alfabeton kaj sugestis kelkajn ŝanĝojn, ekzemple la enkondukon de la sonantoj ts, x k.a. en sia alfabeto. Ŝajnas, ke F. havis ian simpation por la strebado de →René de Saussure reformi la Eo-alfabeton; en 1917 F. aliĝis al la Asotsio por fonetika alfabeto internatsia.

Ĉe Volapük, kiun F. siatempe lernetis kaj nun prijuĝis malutila kaj senperspektiva por la estonto, li almenaŭ rekonis la fakton, ke la ŝlejera lingvo „havas la meriton esti pruvinta, ke la kreo de artefarita, de ĉiuj malutilaj gramatikaj kaj sintaksaj malfaciloj liberigita lingvo estas ebla afero por la tuta mondo.” La aperon de Ido F. bedaŭris, ĉar li taksis la konkurencon inter Eo kaj Ido nenecesa kaj sugestis la unuiĝon inter ambaŭ sistemoj. →Esperantido (1919) de →René de Saussure estas menciita en *La Vojo al la Kulturo* kaj en lia aŭtobiografio *Rerigardo al mia vivo* (p. 275).

*Omaĝe kaj valortakse:* Kiel pledanto kaj teoriisto de la ideo de la neŭtrala universala lingvo F. ja estis siatempe rimarkata de la e-istoj kaj aliaj planlingvanoj, sed poste forgesata. Fakte F. ne fariĝis ‘movadano’; lia intereso pri la neŭtrala universala lingvo estis nur unu el la multaj temoj, kiuj interesis lin, kaj ĝi devas esti vidata en kunteksto kun ili. Tamen la Eo-fakliteraturo menciis lin, sed malofte kaj nekomplete prezentis lin. En sia *Bibliografio de Internacia Lingvo* (1929) →Petro Stojan listigis kelkajn titolojn el la verkaro de F., i.a. *La vojo al la kulturo*, kun ĝia origina germana titolo. *EdEo* (kiu aperis du jarojn post la morto de F.) notis lin ne nur ĉar li estis „fidela membro de UEA, al kiu li regule pagis sian kotizon [kaj] subtenis nian movadon, en kiu li vidis grandan ilon por forigi malsaĝajn barilojn inter homoj kaj popoloj”. →Hans Jakob konfirmis en siaj biografiaj notoj, ke F. venis regule al la CO de UEA en Ĝenevo (Bv. du Théâtre) por pagi sian kotizon. En *EoeP* (1974, p. 260) troviĝas unusola noteto pri F. kaj lia verko *Kulturceladoj de la Nuntempo* aperinta en 1911 en la traduko de F. Uhlmann. *Svisa Espero (SE)* menciis la nomon de F. kelkfoje, koncize raportante pri liaj aktivecoj, ekzemple en n-ro 4-5/1906, ke F. prelegis en Tonhalle (koncertejo) de la urbo Biel-Bienne antaŭ 200 personoj pri la seksa etiko kaj

higieno kaj ke li menciis Eon; en *SE* 2-3/1911, ke aperis *Kulturceladoj de la nuntempo* en la traduko de Uhlmann; en *SE* 6-7/1911, ke F. verkis artikolon pri Eo en la revuo *Schweizer Rundschau für Medizin* (8.4.1911), kaj en *SE* 2/1912, ke sekve al tiu artikolo kaj alvoko en la svisa medicina gazetaro estis fondita *Svisa E-ista Kuracista Asocio (SEKA)* kun 43 membroj sub la prezido de d-ro Th. Christen, docento de la berna universitato. Krome *SE* menciis F. en la julia n-ro de 1919 lige kun la reformo de la Eo-alfabeto, kiun F. subtenis, aŭ en *SE* 3/1934 pri la planado de monumento honore al la mortinta sciencisto. Por la lernolibro *Volkslehrbuch der internationalen Hilfssprache* de →Karl Jost F. verkis la antaŭparolon. En la kongresejo de la 64a UK (Lucerno 1979) unu el la kunsidejoj portis la nomon de F. En nacilingvaj enciklopedioj F. estis menciita unuavice kiel fakulo lige kun la seksa problemo kaj lia esplorado de la homa cerbo kaj de la formikoj. La svisa nacia enciklopedio *Schweizer Lexikon 91 in 6 Bänden* (Luzern 1992) ja notis la fakton, ke F. pledis por la unuiĝintaj ŝtatoj de la mondo, ke li aliĝis al la socialismo kaj la bahaa movado, sed forgesis noti lian interesiĝon pri la demando de la neŭtrala universala lingvo.
Honore al la eminenta gravulo la svisa poŝto eldonis poŝtmarkon (1971) pri F., kaj la svisa nacia banko dediĉis sian 1000-frankan monbileton (serio valida dum la 70-90aj jaroj) al F. Eĉ en GDR aperis en 1982 speciala poŝtstampo esperantlingva rilate al F. Plurloke en Svislando ekzistas stratoj kaj monumentoj laŭ la nomo de F.
*Resume, apreze kaj valortakse:* F. estis grava pioniro sur multaj kampoj kaj kuraĝa homo, kiu ne timis publike defendi siajn vidpunktojn kaj sciencajn konkludojn, eĉ kiam ili estis verŝajne ankoraŭ tro modernaj kaj pro tio rikoltis kontraŭstaron. Kvankam multaj samtempuloj ne sufiĉe perceptis la avangardan karakteron de la ideoj kaj agado de F., kaj kvankam kelkaj el liaj teorioj restas ĝis hodiaŭ kontestataj, F. estas historia figuro kaj signifa, grava kaj valora personeco nelaste ankaŭ lige kun sia kontribuo al la internacilingva diskuto. Pro tio li nepre meritas laŭdon, atenton kaj esploron. Liaj verkoj, precipe *La vojo al la kulturo* kaj *Kulturceladoj de la Nuntempo* (1911), kiuj estas spirite parencaj al la ĉefaj referencoj de la esperantismo, devas esti konsiderataj samrange kun *Interpopola Konduto* de →Edmond Privat, kun la artikoloj de →Hector Hodler pri milito kaj paco kaj kun la pedagogiaj verkaĵoj de →Pierre Bovet. Ilia reproduktado kaj (re-)publikigo estus pli ol pravigita, bonvena kaj inda.
→Bibliografio →Antologio

## *Michel FRÉSARD*


**1930*



Romando-ĵurasano el Le Noirmont/JU, kuzo de →Charles Ecabert, nun emerita instruisto, edukisto, muzikisto, kiu studis en la konservatorio de La Chaux-de-Fonds kaj kiu doktoriĝis pri franca literaturo. En la 1960-80aj jaroj li instruis la francajn lingvon kaj literaturon en Kolombio, unue en la svisa lernejo en Bogotà kaj poste ĉe la universitato de Tunja.
Kiel e-isto de la 1950aj jaroj F. aliĝis al la junularsekcio de SES, kunorganizis ĝiajn unuajn semajnfinojn kaj preparis la fondon de EJS. La partoprenintoj memoras lin kiel orgeniston, kiu distre kontribuadis al pluraj Eo-aranĝoj, ekzemple dum la skiferioj de EJS en Adelboden. En 1959 F. eksperimente instruis Eon al bazlernejanoj en Les Bois/JU (dum →Claude Gacond faris la samon en sia vilaĝo La Sagne/NE). Post sia reveno el Kolombio al Svislando dum iu tempo F. laboris kiel sekretario de KCE ĝis kiam fine de la 1980aj jaroj li plene retiriĝis de la profesia vivo kaj ankaŭ de la Eo-agado.
→Instruado →Junularo →Ĵuraso →KCE

## *Emil FREY*

*1838-1922*

F. naskiĝis (kaj mortis) en Arlesheim/BL kiel filo de konata bazela familio. Li vizitis la lernejojn en Therwil/BL kaj Waldenburg/BL, la gimnazion en Basel kaj la knaban lernejon en Ulm (Germanio). Li komencis studi agronomion en la universitato de Jena (Germanio), finis ĝin sen ekzameno post interrompoj en 1860. En la sama jaro F. formigris al Usono por konatiĝi kun la biena ekonomio. Jaron poste li aliĝis, komence de la usona secesia milito, al la 24a infanteria regimento en Illinois por partopreni ĉiujn militirojn de la nordŝtatanoj, fine en la funkcio de majoro. En la batalo de Gettysburgh en 1863 li fariĝis militkaptito kaj pasigis jaron kaj duonon en la terura Liby-malliberejo. Post tiuj aventuroj F. revenis kiel altrange distingita civitano de Usono al Arlesheim, kie oni kredis lin morta kaj akceptis lin kiel heroon. En 1865 la politika konsilio de BL nomumis lin protokolisto, li mem fariĝis membro de la BL-registaro kiel reprezentanto de la liberaldemokratoj. Kiel gvida forto en la kantona politiko F. puŝadis antaŭen reformleĝojn sur la kampoj de la lerneja sistemo, de la fabrikkontrolado, de la arbara ekonomio kaj rilate ekleziajn demandojn. En 1872 li rezignis pri sia registara mandato por labori kiel redaktoro de la gazeto *Basler Nachrichten,* kies kunposedanto li estis, por influi jam la tutsvisan politikon (precipe rilate la reviziadon de la svisa konstitucio). La kariero de F. kiel politikisto sur federacia nivelo komenciĝis en aŭtuno 1872 per lia elekto kiel BL-reprezentanto en la nacian parlamenton (ĝis 1881). Ĉi tie li agadis kadre de la radikaldemokrata frakcio kaj luktis por alpreno de nova, pli liberala svisa konstitucio. En la t.n. kulturbatalo de Svislando F. montriĝis profunda kontraŭulo de la konservativuloj kaj tial rikoltis la malamon de la katolikoj. Fone de la nacia unuiga movado F. pledis por la centrigo de la armeo. Ĉi tie li apartenis al la plej kompetentaj personoj kaj baldaŭ transprenis la funkcion de ĉefbrigadestro respektive kolonelo. Kiam la svisa ŝtato sendis F. kiel ambasadoron al Usono en 1882, li kaj liaj amikoj interpretis tiun nomumon kiel provon forigi malagrablan politikiston el la publika scenejo de Svislando. Ĉar F. baldaŭ enuis sur sia posteno en Vaŝingtono, en 1888 li rezignis pri tiu ofico por fariĝi redaktoro de la bazela gazeto *National-Zeitung.* Sed F. neniam forgesis sian ambicion fariĝi membro de la svisa registaro. En 1879 F. fariĝis oficiala kandidato de la radikaluloj, kaj la 11an de decembro 1890 la liberaldemokrato estis finfine elektita kiel membro de la svisa registaro, en kiu ekde 1891 li estis taskita gvidi la armean departementon (ministerion), kion li faris seninterrompe kaj plezure ĝis sia retiriĝo en 1897. En 1894 li estis elektita eĉ kiel prezidanto de la Svisa Konfederacio. Post sia demisio kiel registarano li gvidis, ĝis 1921, kiel ĝia direktoro la Buroon de la Internacia Telegrafa Unio (BITU) en Berno, rikoltante en tiu funkcio la senriproĉan agnoskon de la publiko. F. akcelis i.a. la universalan disvastiĝon de la kabloretoj, pli poste de la senkabla radiotelegrafio. En 1911 li fariĝis honora doktoro de la berna universitato. Lia edzino Emma Kloss, kiu mortis tro frue pro tuberkulozo, estis la filino de pola rifuĝinto, kiu fariĝis atestanto de la perturboj de la bazela kantona separo kaj poste servis al la juna kantono kiel polica sekretario kaj banka kasisto. Do la simpatio de F. por la pola okulkuracisto L.L. Zamenhof tra la propra familia kanalo supozeble ne estis hazarda.

*Planlingvoj / Esperanto:* En 1913 F. bonvolis akcepti la honoran prezidon de la 9a Universala Kongreso de Eo, okazinta inter la 24a kaj 31a de aŭgusto 1913 en Berno. En la ĉeesto de L.L. Zamenhof kaj de aliaj gravaj funkciuloj de la Eo-movado F. salutis la kongresanojn, memorigante la apogan sintenon de →Ernest Naville al Eo, esprimante la dankemon kaj admiron al Zamenhof pro lia granda

verko (→Universalaj Kongresoj, →Antologio). Lia parolado estis publikigita krom en la Eo-informiloj ankaŭ en la periodaĵo *Die Weltsprache,* organo eldonita de la svisaj idistoj. Kiel alta protektanto de la berna UK F. samtempe oficis kiel honora prezidanto de *Verband für die Schaffung eines Weltsprache-Amtes,* tial li troviĝis en iom tikla situacio kaj estis devigata proklami sian neŭtralecon en la konflikto inter e-istoj kaj idistoj. (→Ido)

*Valorpritakso:* Kvankam poste forgesita, F. restis en la memoro kiel internacie respektata homo, brila oratoro, senlaca idealisto kaj impresa figuro kun karismo, kun humanisma sinteno kaj talento de diplomato. Samtempe li konkrete agis kaj ne kaŝis publike siajn opiniojn. Kiel multaj aliaj samtempanoj F. perfekte komprenis la ideojn kaj celojn de la movado por neŭtrala universala lingvo ĝenerale kaj de L.L. Zamenhof kaj de la Eo-movado aparte; per lia sinteno F. faris al la planlingva kaj Eo-movadoj sendube gravan servon.

→Universalaj Kongresoj →Ido en Svislando →Politiko →Antologio

## *Jules FREYMOND*

*1888-1978*



F. estis fervojisto kaj Eo-pioniro, veterano kaj aktiva membro de la laŭzana EG Zamenhof. Li vigle agadis ĝis sia lasta vivojaro. Aliĝinte en 1929 al SAEF, li apartenis al la plej fruaj aktivuloj de la svisaj Eo-fervojistoj. Kun William Perrochon k.a. li formis la grupon Razude en Laŭzano, kiu estis la kerno de SAEF. F. prizorgis la publikigon de artikoloj pri Eo en la franclingva sindikata fervojista gazeto *Le Cheminot.* Ĉe la enirejo de la restoracio por la fervoja personaro en Laŭzano troviĝis la montrokesteto de SAEF, kiun F. aktualigis. La nelacigebla vojaĝanto estis ankaŭ aktivulo de la svisa kaj internacia fervojistaj abstinaj movadoj: li fondis la abstinan grupon en Laŭzano kaj sugestis senalkoholajn personarajn restoraciojn; li inicatis kaj gvidis ankaŭ la abstinan ĉaledon Notre Abri apud Sonloup/VD. Okaze de la SAEF-jubileo en Lucerno en 1975 oni festis lin kiel ŝatatan veteranon.

→Fervojistoj →Vaŭdo



## *FRIBURGO*

Kantono en okcidenta Svislando franca kaj parte germanlingva (franclingve: Fribourg, germanlingve: Freiburg, mallong. FR: 1671 km$^2$, 254'000 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Fribourg.

La unua nomaro de *Svisa Espero* en 1903 menciis 12 personojn el la friburga kantono, inter ili C. Brunhes, universitata profesoro pri geografio, Girardin, universitata docento, H. Savoye kaj Bosson, instruistoj de la granda seminariejo, A. Hug, instruisto pri matematiko, Hartmann, orgenisto, Michel kaj Pasquier de la orfa instituto kaj kelkajn studentojn. La dua nomaro listigis krom du aliaj altlernejaj docentoj (L. Gobet kaj L. Sauser) ankaŭ M. Musy, la konservatoron de la kantona muzeo. En 1911 iu G. Engster el Agriswil/FR prelegis en Kerzers/FR pri Eo.

La iama e-isto →*Adolphe Creux* (1876-1933), katolika pastro en Rue/FR, aliĝis al la →Ido-movado, al kiu li servis kiel Ido-agento en Sorens/FR. En 1922 Creux aliĝis al la lingvo →Occidental-Interlingue.

En 1958 okazis en Broc/FR internacia pedagogia semajno, kiun organizis →Marcel Erbetta sub la aŭspicio de la Freinet-movado La unikan konferencon partoprenis 44 personoj, inter ili pluraj instruistoj kaj kompletaj familioj kun 16 infanoj.

En Courtepin/FR loĝas kaj laboras *Stani Mach* (*1954), diplomita inĝeniero pri nutraĵteknologio, pol-devena e-isto de ĉirkaŭ 1975.